

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:06, februaro 4.

Pezo: Word 40, PDF 310 KB, Alkroĉaĵo: 385. Sume 733 KB

La Kulturcentro de Grezijono preparas sin por printempo

KURSARO
stage
PRINTEMAS
12 - 21 aprilo 2024

Maison Culturelle
de l'Espéranto
château de
Grésillon
F-49150 Baugé en
Anjou

Vidu/voir
gresillon.org/p

Marion
Quenut
kurso/cours
A1 A2

Zsófia
Kóródy
kurso/cours
B1

Pawel
Fischer-
Kotowski
kurso/cours
B2

Duncan
Charters
kurso/cours
C1/C2

Madagaskara propono

Elsendo n-ro 138 de Aminda Radio Esperanto proponas al vi la duan parton de la artikolo pri la percepto de tempo laŭ la merina tribo. Krom tio, ni prezentos al vi kelkajn novaĵojn de Malagasio dum la kuranta monato antaŭ ol kune aŭskulti neesperantistan kanton pri Jerusalemo. Ekde nun, ni provos plimallongigi nian podkaston, sed sen perdi ĝian sukcon. Agrablan aŭskultadon al vi ĉiuj!

<https://youtu.be/XPdKu3yOjAE>

Henriél FIDILALAO.

Facila, sed iom nigrahumura rakonto

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/sukceso-pu%C5%9Das-homon-iri-pluen-r408/>

Verkis: Honoré Sebuhero, Kongo DR. Prilaboris: Anna Löwenstein

Facila, pri perfida epizodo

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoi/louis-de-beaufont-kaj-la-granda-perfido-r409/>

La disvastigo de Esperanto – nia eterna debato

Ekzistas diversaj manieroj disvastigi Esperanton. Prezenti la lingvon kiel solvon por monda lingva problemo estas unu el tiuj manieroj. Mi konsentas ke tiu maniero ne estas facila ĉar ĝenerale homoj kiuj konscias pri tiu problemo, aŭ kontentas pri uzo de la angla, aŭ se ne kontentas ne povas influ.

Tamen aperas ke multaj homoj kiuj venas al Esperanto, lernas kaj uzas ĝin, ne faras tion por solvi lingvan problemon. Ili lernas Esperanton pro diversaj aliaj kialoj (scivolemo, amuziĝo, emo al novaj spertoj ktp). Kaj por ke tiaj homoj interesiĝu pri Esperanto necesas ke ili eksci pri ĝi. Eble homoj kiuj povus interesiĝi pri la lingvo, estas nur 2% de la tuta homaro sed ĉar nur 2% de la tuta homaro scias pri Esperanto, je la fino estas nur $0,02 \times 0,02 = 0,0004$ esperantistoj (1 el 2500 homoj). Se ĉiuj homoj en la mondo sciis pri Esperanto estos 1 esperantisto el 50 homoj. Eble la ciferoj estas aliaj, sed restas la principo.

Didier Janot, Francio

SMG prezentas siajn tri grupojn.

SMG verkis pri tiu temo jam en 2014, kaj prezentis sian tezon al la partoprenantoj en Fai de la Paganella. Mi proponis tri ĉefajn motivojn por la lernado de Esperanto, la unua triono venas pro idealismo, la sekva triono pro sociaj kialoj – la kongresoj kaj renkontiĝoj kaj amikeco kaj la lasta triono pro enamiĝo kun la lerta konstruo de la lingvo; inter tiuj estas la poliglotoj, kiuj kolektas lingvojn kun la entuziasmo de fervoraj poŝtmark-kolektantoj. Resume, jen mia tezo.

- 1) Esperanto – la justa lingvo
- 2) Esperanto – la komunuma lingvo
- 3) Esperanto – la fascina lingvo

Rimarku, ke mi ne listigas la facilecon de la lingvo. La facilecon oni devas kontraŭpesi kontraŭ la utileco. Vane la lingvo estas facila, se homo ne trovas adekvatajn uzojn por ĝi.

Reves(z)tiĝo en Hungario

La konata hungara esperantista ĵurnalisto Sándor Révész en ĵusa artikolo aperinta en populara hungarlingva periodaĵo (SMG: HGV – pli-malpli la hungara 'Economist') rakontis pri siaj unuaj spertoj de demokratia decidofarado, kiujn li ekhavis dum la IJK en Raŭmo 1980. *Libera Folio* republikigas la ĉefan parton de la teksto kun permeso de la aŭtoro, traduke de István Ertl. Ĉu plu Esperantujo povus funkcii kiel modelo de demokratio?

Fonto: Libera Folio

Vortara abundo en Hungario

Pli ol 250 teknikaj vortaroj ekzistas en la kolekto de la hungara aktivulo László Szilvasi. Ili apartenas al la kolekto de la projekto STEB (Scienc-Teknika Esperanto-Biblioteko). La vortaroj estas libere alireblaj per 90 retligoj.

Mi lasas la linion kun la ligoj en la hungara, ĉar mi timas fuŝi la ligojn:

A szakmai szótár-gyűjtemény megtalálható a publikus [fészbukos oldalunkon](#) vagy a [Virtuális Esperantó Klubban](#).

Koncizigita kaj tradukita el teksto de Szilvási László, Eszperantó Alapítvány

Jen la agadplano en Kongo DR por 2024

La jena agadplano rezultas de la asigno de la nova estraro, kiu donis al si kiel prioritaton, revivigi kaj pliefikigi la agadon de la landa asocio de UEA en Kongo DR. Dum 2024, DKEA, planas listigi kaj administri klubojn diskonigante al ili informojn rilate al DKEA kaj la Eo-movado ĝenerale. EKO alkroĉas la raporton (385 KB).

La raporto farita en Kinŝaso januaro 2024, Sro Guy Roger Ileka kaj Sro Arlain Kizeyidioko

Bulteno de UEA el la Nov-jorka oficejo

Numero 68 – januaro – februaro 2024

- Kunvenoj en Tanzanio kaj Burundo pretigas la kongreson de 2024 en Afriko.
- Multlingva eduko estas esenca, UEA deklaras.
- Hungario: Impona Esperanto-historio.
- Ĉinio: Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko festis dek jarojn.
- *Neniam plu*: Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Memoro de la Viktimoj de la Holokaŭsto.

La PDF, eĉ post sveltigo restas peza je 1 MB. UEA riproĉas min pro dissendo de tiom pezaj alkroĉaĵoj. Kiu deziras ricevi ĝin, skribu al SMG (1,05 MB).

Kongreso de ELI aprile

La 24-a Israela Kongreso kun 5-taga antaŭkongreso okazos de la 11-a ĝis la 14-a de aprilo 2024 en Jerusalemo. Informoj pri tio aperas sur la dorsaj kovriloj de la lastaj numeroj dela revuoj *Esperanto* kaj *Israela Eperantisto*, samkiel en Eventa Servo (<https://eventaservo.org/e/israela-kongreso-2024>).

Pliaj informoj aperas nun en la kongresa retpaĝo, kun detaloj pri la kongresejo, kotizoj, programo kaj kaj antaŭkongreso: <http://esperanto.org/ik24.html>. Espereble baldaŭ pretos la reta aliĝilo.

Intertempe, israelanoj kiuj volas jam nun aliĝi por certigi sian lokon en la gastejo (ni sukcesis rezervi limigitan nombron de ĉambroj) povas kontakti Jehoŝua (054-906-7030). Eksterlandanoj bonvolu kontakti min, aparte pri la antaŭkongreso.

Jam nun estas kvar certaj kaj du verŝajnaj eksterlandaj partoprenantoj en la Kongreso kaj antaŭkongreso. Ni atendas vian aliĝon!

Amri kaj la kunorganizantoj

Plia kurso en la Esperanto-urbo

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto-kurso

Gvidantonomo: Zsófia Kóródy. Aldoninto: herzbergcentro

Loko: Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27621>

<edukado.net> nun interaktiva!

Al <edukado.net> aldoniĝis INTERAGA ero ĉe Instrumaterialoj:

Titolo: Instruistoj kredigis, ke ekis milito

Kategorio(j): Aŭdkomprena; Paroliga

Verkinto(j): Aaron Chapman; Katalin Kováts; Petra Smidéliusz

Temo: Edukado, paniko

Tipo: Interaga ekzerco je la nivelo B2.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/instrumaterialoj?iid=23532>

Nepre serĉu ankaŭ la INTERAGAN VERSION!

Pri Litova kunlaboro universitata

Ni raportis pri tio en lastatempa EKO-komuniko. Temas pri agado en Kaunas, la dua plej granda urbo en Litovio. Nun aperis videoreklamo:

<https://www.facebook.com/reel/408643114852616>

Povilas JEGOROVAS

La ekologia avantaĝo de vojaĝado

La ekologion oni povas mezuri laŭ la kvanto de la karbon-dioksido eldonata en vojaĝo de Milano al Romo:

Trajno: 25,2 kg (100%)

Aŭto: 85,3 kg (338,5 %)

Aviadilo: 113,0 kg. (448,4%)

Fonto Itala Fervojisto 2023/12, kun danko ricevita



===== vortoj: 1150 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>.